NI NUTRU LA REGIONOJN

Por ĉies rajto al sana kaj ekvilibra nutrado,
Por biena agro-ekologia politiko,
Por dungiteco de gejunuloj,

Ni kune intervenu en la debaton de la regionaj balotoj 2010

Igi la demandon pri nutrado prioritato por disvolviĝado ne estas paŝo malantaŭen, sed trafa respondo al defioj, kiujn homaro alfrontas (nutra krizo, protektado de biodiverseco, klimatŝanĝiĝo). Ankaŭ kaj precipe temas pri tio, malfermi al ĉiuj niaj kuncivitanoj perspektivon pri laborpostenoj, pli ĝuste pri utilaj dungeblecoj, kiujn solaj nek industrio, nek la serva sektoro povas kontentigi. Temas hodiaŭ pri tio, respondi naskiĝantan socian peton de gejunuloj, pli kaj pli multnombraj, pli kaj pli kvalifikitaj, kiuj strebas al profesia enposteniĝo en nutra agrikulturo. Temas pri tio, respondi al provizmalfacilaĵoj de la kolektiva satigsektoro (en tiu sektoro estas entreprenaj, lernejaj manĝejoj ekzemple) koncerne kvalitan kaj proksiman nutradon.

Igi la nutran demandon prioritato, estas konstrui kun emerĝaj landoj daŭrpovan respondon por ĉesigi malsaton, fondante nutran suverenecon ekde la loka ĝis la internacia nivelo per agrikulturaj politikoj favorigantaj obliĝadon de nutradcelaj terpecetoj kaj per kreado de trejneblecoj kaj setlado de gejunuloj en agroekologiajn profesiojn kaj sanan nutradsektoron.

Igi la nutran demandon prioritato, estas rekonsideri politikojn pri teritoria aranĝado kaj urbanismo, kiu okup-rabas en Francio la ekvivalenton de 60 000 hektaroj de agrikulturcela spaco jare, tio estas malapero de departamento ĉiujn ses jarojn. Estas uzi la bienaron por modifi disvolviĝoskemon kaj ebligi al civitanoj reakiri novajn liberecojn kaj novajn rajtojn.

Igi la nutran demandon prioritato, estas bremsi disvolviĝadon de supervendejoj kaj subteni sendependan proksiman komercon, kaj favorigi disvolviĝadon de subĉielaj bazaroj kaj de transform- kaj stokad- infrastrukturoj.

Igi la nutran demandon prioritato, estas rekonsideri ekonomian disvolviĝadon, kiu de jardekoj kontentiĝas per granda senlaboreco kaj necertaj salajroj, kiuj hodiaŭ trafas ĉiujn sociajn tavolojn. Por protekti supermezurajn privilegiojn de kelkaj, ekonomia disvolviĝado instigas niajn estrojn savi senkompense malbonfaran kaj maljustan financan sistemon, surŝultrigante al impostpagantoj, salajruloj kaj estontaj generacioj tre pezan ŝarĝon, sen utili al ekonomio.

Igi la nutran demandon prioritato kondukas al tio:

- ebligi al kampuloj vivteni sin per sia laboro fronte al financaj postuloj de amasdisvendado kaj de iuj agronutraj sektoroj. Laste aperinta raporto de la prez- kaj profitobservada instanco ebligas okulfrape evidentigi ke la farmbienistoj (aparte la produktantoj de lakto) kaj la konsumantoj estas melkbovinoj por publika politiko, kiu celas kredindigi reklamajn kaj mensogajn sloganojn de la amasdisvenda sektoro proklamanta defendi la aĉetpovon de la konsumantoj.

- Konsideri ke eĉ se ni bezonas ĉiujn agrikulturistojn, nepras fini tian agrikulturon, kiu nutras homojn pli kaj pli malbone (kancerdisvolviĝado, malkresko de fekundeco), kiu elĉerpas kaj poluas grundojn kaj akvon kaj detruas sovaĝan kaj agrikulturan biodiversecon. Disvolviĝado de invadema verda algo en Bretonio ligita kun la koncentriteco de porkobredaj aktivaĵoj aŭ ligita kun malapero de humidaj areoj de la francaj marĉoj « Poitevin » pro supermezura akvopostulemaj maizokultivaĵoj estas ekzemploj inter aliaj.

- Disvolvi kaj valorigi agrikulturan kaj sovaĝan biodiversecon (plantoj kaj bestoj) en farmbienoj, favorigi interŝanĝojn de kompetentoj kaj de reprodukteblaj semoj inter kampuloj kaj ĝardenistoj, promocii lokajn rustikajn bestorasojn kaj protekti la regionan havon kontraŭ GMO, biologia piratado kaj mallojala ekonomia konkurenco; diversigi

produktadon kaj favorigi nutraĵan memproduktadon.

- Ellabori urbanismajn regulojn, kiuj bremsas urbosterniĝemon kaj kiuj asocias konstruadon de moderprezaj loĝejoj kun aliro al kultivebla terpeceto.

- Integri sur la devigan studvojon edukadon pri ĝardenado kaj kuirarto kun la celo tiel malpli dependigi nin de produktaĵoj transformitaj de la nutraĵindustrio.

- Oferti al tiuj, kiuj tion deziras kaj interalie al gejunuloj, eblon por produkti kaj disvendi nutraĵon sanan kaj de ĉies alireblan kaj aliri al tiuj resursoj (bieno, akvo, reprodukteblaj semoj, etaj ekipaĵoj, loĝejoj…).

Igi la nutran demandon prioritato, estas ĉies afero.

Kiel sekvo de la agado « Ni nutru Eŭropon » lanĉita dum la lasta majo de *Minga* kaj *Nature & Progrès* por interpelacii kandidatojn por eŭropaj balotoj, la venontmartaj regionaj balotoj estu okazo por prilumi tiajn demandojn invitante ĉiun kandidaton determini sian sintenon pri precizaj kaj kvantaj celoj, kiel sekvas:

- **regiona plano pri dungiteco por farmsetlado, surbaze de lernoprocezo (unuafoja lernado aŭ plulernado), surbaze de esplorado, de trejnado kaj akompanado por promocii etskalajn projektojn kaj por agroekologia kultivarto, por respondi interalie al bezonoj de kolektiva satigsektoro (malsanulejoj, pensiulejo, entreprenaj kaj lernejaj manĝejoj..)**
- **ambicia biena politiko por protekti kaj disvolvi nutraĵproduktadon, prioritate en ĉirkaŭurbo**
- **civitana observkomitato por taksi la antaŭeniron de tiu plano dum la tuta mandato (civitana viglado).**

Hodiaŭ, semoj estas ankaŭ varo konfiskita de la intelekta posedrajto kaj la tergrundo spertas kiel neniam antaŭe spekuladon nutratan de urbosterniĝemo kaj erigado de la kampara spaco. Endebatigo de tiu temo sekve levos fortajn kontraŭstarojn. Ne estas hazardo se la timidaj laŭregulaj protektprovoj ne finsukcesis (leĝo de 2005 pri disvolvado de kamparaj teritorioj).

Konstatinte ĉion ĉi, ni alvokas konsekvence al konsistigo de ampleksa civitana priagigo por organiziĝi ĉirkaŭ regionaj grupoj por realigi tiujn proponojn rilatajn kun teritorio de ĉiu regiono antaŭ la fino de la jaro.

Lanĉita de Minga, Nature et Progrès, Frères des Hommes

Unuaj subskribintoj:
Réseau Semences Paysannes, Amis de la Terre France, Comité National de Liaison des Régies de Quartier (CNLRQ), Coopaname, Action Consommation, Confédération Paysanne, Réseau Ecobatir, les AMAP d'Ile de France, de Rhône Alpes, du Limousin et de la Région PACA, Terre de Liens Rhône-Alpes, FNAB - Fédération Nationale d'Agriculture Biologique des régions de France, Bio Consom'acteurs, Fruits Oubliés Réseau, Slow Food France, Agrisud International, Alliance Paysans, écologiste, consommateurs Loire, terre et Humanisme, les AMAP de la Région Nord Pas-de-Calais, La Fédération des AMAP de Picardie,

Konataj subtenantoj :
Dominique Méda (agregaciito pri filozofio), Jean Gadrey (profesoro pri ekonomio), Jacques Testart (honora esplordirektoro ĉe l'INSERM), Isabelle Stengers (filozofo, Libera universitato de Bruselo), Christian Jacquiau (kont-ekspertizisto), Christian Vélot (lekciisto pri molekula genetiko en la universitato Paris Sud), Michel Onfray (filozofo), Marc Dufumier (agronoma inĝeniero kaj profesoro ĉe AgroParisTech), Philippe Desbrosses (agrikulturisto, doktoro pri naturmediaj sciencoj), François Plassard (inĝeniero pri agrikulturo, doktoro pri ekonomio), Olivier Porte (reĝisoro), Gilles Clement (pejzaĝisto), Susan George (verkisto), Edouard Chaulet (Urbestro de Barjac), Jean-Paul Jaud (reĝisoro de la filmo "Nos enfants nous accuseront" (Niaj infanoj akuzos nin)).